# Eŭropa Bulteno

Novjaro 2007, № 12 (54)

## *De la redakcio…*

**Novjara Saluto 2007 de la Prezidanto de EEU**

**Okaze de komenco de nova jaro estas por mi granda plezuro saluti ĉiujn samideanojn en nia Eŭropa movado por lingva justeco. La jaro 2007 alportos kaj la 120-an naskiĝtagon de Esperanto, kaj la EEU-kongreson en Maribor, kie mi esperas revidi vin ĉiujn multnombre.**

**La pasinta jaro havis siajn ĝojojn kaj malĝojojn. Grandega perdo estis la Esperanto-Redakcio de Pola Radio. La fakto ke oni elektis ĝuste la Zamenhoftagon de 15 decembro kiel la lastan tagon de disaŭdigo substrekis la kontraŭjudajn motivojn de la decido, kiujn S-ro Targalski, la vice-prezidanto de Pola Radio, senĝene malkaŝis en intervjuo kun la pola taga gazeto, "*Gazeta Wyborcza*". Pro la forta reago de la Esperantistaro, almenaŭ estis lastmomenta decido daŭrigi la disaŭdigojn rete.**

**Sed ege pozitiva estis kaj daŭre estas la laboro de Profesoro François Grin de la Universitato de Ĝenevo. La nun fama GRIN-Raporto, jam legebla ankaŭ en Esperanto, donas al ni la pli konkretan kaj facile kompreneblan kialon por nia laboro: la ĉiujara gajno de € 17 miliardojn fare de la brita ekonomio pro la nuntempa internacia dominado de la angla lingvo. Enorma kaj konstanta montransfero al jam riĉa lando de malpli riĉaj landoj. Tio devus interesi eĉ homojn kiuj tute ne interesiĝas pri lingvoj. Ni ne tro disu nian mesaĝon: ni substreku ĉi-tiun kernan mesaĝon de Grin. Nur kiam ni sukcesos informi homojn kaj tiel veki malkontenton pri la nuna lingva situacio, ni havos ŝancon interesigi homojn al solvo por la problemo: nia kara Esperanto.**

**Laste, sed ne mapli grave: VIKIPEDIO tre gravas, ĉar ĝi estas montrebla al ĉiuj. Jam estas 62,000 artikoloj en la Esperanta Vikipedio. El la 229 lingvoj en kiuj Vikipedio ekzistas, la nia estas en loko 15. Mi elkore kuraĝigas vin ĉiujn verki por Vikpedio. Ni faru celon de 100,000 artikoloj dum 2007!**


**Mi deziras al vi ĝojplenan, prosperan kaj tre sanan jaron.**

**Seán Ó Riain**
**Prezidanto de EEU**

## *Pri nia kongreso…*

# 7-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio okazos en Maribor, Slovenio, ekde la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2007

**Maribor estas laŭ grandeco la dua urbo en Slovenio. Ĝi estas ekonomia, universitata, kultura, sporta kaj foira centro de nordorienta parto de la ŝtato. Situanta en la koro de Mezeŭropo, en la tranĉpunkto de gravaj transportaj vojoj, kiuj iras el meza al sudorienta Eŭropo kaj el okcidenta Eŭropo al Panonia malaltaĵo. Kuŝas ĝi ĉe la rivero Drava, kie intertuŝas kvin diversaj provincoj: transporte kaj energiprovize grava Drava valo, brutbredista kaj turisma Pohorje, arbara kaj agrikultura Kozjak, vinbera kaj fruktarbara Slovenske gorice, kaj plantaĵkultura Dravsko polje. Tia situo difinis al la urbo gravan rolon en la pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ, kaj verŝajne eĉ pli en la estonteco.**
**En preskaŭ miljara periodo Maribor ĝisvivis progresojn kaj regresojn. Urbajn rajtojn ĝi ricevis en la 13-a jarcento. En malfrua mezepoko la urbo devis sin defendi, per fortaj muroj ĉirkaŭintaj la urbon, de Turkoj kiuj aspiris al centra Eŭropo. Restaĵoj de muroj estas bone konservitaj en Lent, malnova urboparto sur bordo de Drava.**
**Kiel la urbo ricevis la nomon? La unuan fojon ĝin notis en iu letero el 1836 slovena poeto Stanko Vraz. Li komponis ĝin el la vortoj mar (zorgo, ardo) kaj bor (lukto), laŭ german-slava paro Brandenburg-Branibor. Poeto kaj politiko Lovro Toman en la jaro 1861 fiksis ĝian nomon en poemo M a r i bor (Zorgo kaj lukto). Ĝis tiam kaj ankaŭ poste, slovenoj en popola ĵargono nomis gin Marporg, laŭ germana Marburg, kiu estiĝis el mezepoka Marc-purch, signifanta urbon en la limprovinco.**
**Hodiaŭ Maribor estas urbo kun universitato, episkopsidejo, evoluinta kulturcentro kun teatro, opero kaj baleto, pluraj galerioj, muzeoj, koncertaj kaj kongresaj haloj, komercaj centroj, internacia flughaveno, fama urba parko, sportaj kaj refortigaj objektoj, ktp.**
**Tial ĝi klopodas evoluigi kvalitan turismon kiu baziĝas antaŭ ĉio, sur kvalitaj vino kaj gastronomio. Ankaŭ sur bone konservita urbokerno, kiu reflektas pasintajn jarcentojn: gotikon sekvis renesanco, sed la plej profundan postsignon al la urbo lasis baroko. Pulso de la urbo respeguliĝas sur mariboraj placoj kaj stratoj. Aparte alloga estas Lent, malnova urba parto ĉe la bordo de Drava, kiu dum historio dividis la urbon, sed hodiaŭ forte ligas ĝin.**




# KONGRESEJO KAJ ALIAJ KONGRESAJ EOJ

## KONGRESEJO-TEATRO


Foto 1


Foto 2


Foto 3

**Dum la 7-a kongreso de EEU, plejparte ni kongresumos en la Slovena Nacia Teatro (Slovensko narodno gledališče, kiu situas en la centro de la urbo. En la sama placo, nomata Slomškov trg estas ankaŭ sidejo de Maribora Universitato, Katedralo, ĉefa poŝtoficejo, sidejo de eklezio. La Teatro (foto 1.) mem estas malnova konstruaĵo kun tri salonoj kaj granda aŭlo. En la aŭlo de Kongresejo funkcios informa punkto ekde la 8-a horo matene ĝis la 19-a horo ĉiutage. Tie vi povos aĉeti librojn en librovendejo, trarigardi kongresajn novaĵojn renkontiĝi kun amikoj kaj kafumi en Teatra restoracio.**
**En Teatro ni havos solenan malfermon kaj fermon en "Velika dvorana"(granda salono) vidu foton 3. Kelkaj teatraĵoj, koncertoj kaj konferenco "Interkultura dialogo" okazos en la kongresejo. Vendrede, la 3-an de aŭgusto la kongresa bankedo okazos en "Kazinska dvorana" (foto 2.). En la mapo de la urbo la Kongresejo estas markita per numero 1.**

**Ni havos al nia dispono ankaŭ aliajn domojn en la urbo:**

## KIBLA -kibernetika laboratorio


KIBLA ekstere


KIBLA intere

**Ĝi estas afabla loko kiun ni uzos por akceptejo en sabato la 28-a de julio 2007. Ĝi estas markita sur mapo de urbo per numero 2. KIBLA estas fama maribora loko kie kuniĝas gejunuloj en diversakj kreativaj laboroj. Multaj kursoj pri informadtiko, dancoj… okazas tie. Ggrandan salonon oni uzas por ekspozicioj, kaj ankaŭ ni faros ekspozicion kun temo "Akvo" tie.**
**KIBLA havas ankoraŭ unu salonon kiu estas uzata kiel multfunkcia ejo. Kongresanoj povos retume de iliaj 10 komputiloj aŭ ligi siajn proprajn porteblajn komputilojn al reto tie (kabele aŭ senkabele). Uzado de interreto estas por kongresanoj senpaga.**
**En KIBLA laboros kafejo kie oni povos trinki kafon, teon, naturajn sukojn kaj manĝi buterpanon kaj kukojn. Kaj kompreneble multe babili kun geamikoj.**
**Okaze de babilado, ni invitas ĉiujn veni al "Babilejo" kiu funkcios en la ejo ĉiutage inter 16.30 kaj 18.00 horo.**
**Infanoj kiuj partoprenos la Eŭropan infanan kongreseton kunvenos la 28-a de julio en tiu loko, de kie ili estos gvidataj tra urbo kaj poste al ilia kongresejo sur Pohorje.**

**Aliaj infanoj havos eblecon amuziĝi en la ejo ĉiutage inter la 10.00 kaj 11.30 kiam okazos diversaj infanaj interesaĵoj, rakontoj, origamo, pupteatro…**
**KIBLA lfunkcios por kongresanoj ĉiutage inter la 9-a matene kaj 19-a horo.**

## ANDRAGOŠKI ZAVOD (POPOLA UNIVERSITATO)





**En la mapo de la urbo ĝi estas markita per numero 3.**
**En la popoluniveristato estos ĉefa oficejo de la Kongreso.**
**Diversaj grupoj kiuj interesiĝas pri kunvenoj dum la Kongreso povas sendi informojn kaj mendojn pri iliaj bezonoj. Ni aranĝos liberan lokon kiei vi povos trankvile labori.**
**En Andragoški zavod kunsidos Terminologia komisio, kiu diskutos sciencan terminologion en Esperanto. Ankaŭ "Lingvolanĉilo" grupo kaj "AKEL" organizos siajn kunvenojn tie.**
**Diversaj rondtabuloj okazos en sama ejo laŭ horaro (ĉiutage inter la 17.00 kaj 19.00).**
**Se vi volus prezenti vian temon al aliaj kongresanoj, skribu al ni.**

## GRAJSKI TRG- KASTELA PLACO

**En la mapo de la urbo ĝi estas markita per numero 4.**





**Kastela placo estas unu el la ĉefaj mariboraj placoj, kie okazos vesperaj koncertoj.**
**En la sama placo estas hotelo OREL (aglo). En la mapo de la urbo ĝi estas markita per numero 5, kaj kinejo "Udarnik", kie estos ĉiutaga filma programo, inter la 12.00 kaj 13.30 (numero 6). Tre proksime, nur kelakajn paŝojn en direkto al la kongresejo estas hotelo UNI (numero 7). Hotelo Piramida estras markita per numero 10 kaj lokiĝas proksimume 150 m oriente. Aŭtobusa stacidiomo estas markita per numero 11 kaj fervoja per numero 12.**



## URBA BIBLIOTEKO

**En la mapo de la urbo ĝi estas markita per numero 8.**
**Literaturaj vesperoj, prezentado de novaj libroj kaj kurso de esperanto okazos en urba biblioteko, proksime al kongreseo.**

## SIDEJO DE UNIVERSITATO

**En la mapo de la urbo ĝi estas markita per numero 9.**
**En la konstruaĵo de Universitato okazos intenacia konferencio pri "AKVO". Ĝi lokiĝas apud kongresejo.**

## STUDENTA DOMO





**Studenta domo estos loĝejo kaj kongresejo por partoprenantoj de Eŭropa junulara aranĝo. Ĝi estas proksimume 1600 m for de Teatro (Kongresejo), sed inter ili ofte veturas lokaj aŭtobusoj.**
**Krom 200 ĉambroj por loĝado, la studenta domo havas kelkajn utilajn ejojn. Salono por koncertoj (por proksimume 150 homoj), estas uzebla por montri filmojn, muzika ĉambro kun piano, lernoĉambroj por diversaj agadoj, reta punkto, multaj etaj "babilanguloj" tra la tuta domo, manĝejo kun bongustaj manĝoj (povas esti uzita ankaŭ por aliaj aktivecoj)…**
Por ke la kongreso de EEU estu vigla, etosplena kaj agrabla, ĝi bezonas (same kiel Eŭropo mem) gejunulojn. Pro tio ĉi-jare planatas vasta programo por junaj homoj, kiuj volas eluzi eblecon esperantumi somere: konatiĝi kun novaj amikoj, renkonti jamajn, lerni ion novan, turismi en nova lando, partopreni prelegojn, aŭ simple nur babili, danci, spekti filmojn - amuziĝi.
Por ĉiuj tiuj eblecoj estas preparataj programoj.
Speciale ni volas informi pri jenaj programeroj:

- ***„Flugiloj de malfacila vento“*** – plua el la serio de jam popularaj seminarioj, kiuj instigas gejunulojn iĝi instruantoj de Esperanto (taŭga ankaŭ por plenkreskuloj) – sub la gvido de Irina Gonĉarova
- **Filmejo** - Ĉiutaga film-projekciado (spektu filmojn en E-o, aŭ subtitolitaj E-e, ajnan tagon – preparatas tuta aro da filmoj – de ĉiuj eblaj ĝenroj kaj devenoj. (filmestro: Marek Blahuš)
- **Prezentoj de laboro de E@I** – junulara organizo, kiu en E-o medio famiĝas per altnivelaj ret-paĝaroj, organizado de seminarioj kaj lastatempe ankaŭ pri eldon-laboro. (Prelegoj, diskutoj, prezentoj de ĉiuspeca agado de la grupo. Gvidas Peter Baláž – E@I-kunordiganto)
- **Karaokeo** – via ŝanco iĝi „muzik-stelo“ – almenaŭ dum tiu ĉi programo, kie eblos provi kanti ĉu esperante, ĉu nacilingve – kaj provi tiel konkurenci al la veraj „steloj“. Se vi ĉiam revis pri admiro de la publiko kaj emas je stelaj manieroj, nepre venu kaj kantigu la salonon.
- **Scio-kvizoj** – pri Esperanto, sed ankaŭ pri aliaj temoj – en amuza etoso kaj kun valoraj premioj.
- **Eta kurso de masaĝo**- Waldemar Lipovicz
- **Matena gonga terapio**- Lučka Šantl
- **Nokta montmigrado**- rigardado de steloj kaj nokta pikniko-gelernantoj de studenta domo
- **Nokta banado**
- **Libroloterio**
- **Koncertoj, dancoj**
- **Kaj multaj aliaj**…

Pri aldonaj programeroj junularaj ni aktuale informados ĉe la hejmpaĝo de la kongreso:
[http://www.esperanto-maribor.si/index.php](http://www.esperanto-maribor.si/index.php)

# EŬROPA INFANA KONGRESETO






**Paralela programo de EEU kongreso estos ankaŭ la Eŭropa Infana Kongreseto (EIK).**
**Ĝi okazos en proksima infana ripozejo Areh sur montaro Pohorje. Areh situas 25 km de Maribor,** ĝia **surmara alto estas 1246 m. La klimato estas modera alpa kaj ĝi bone influas kontraŭ diversaj malsanoj de spirvojoj kaj pulmoj. Ĝi helpas ĉe diversaj alergioj kaj nervostreĉo.**
**Infanoj loĝos en "Čandrova koča", kie oni kutime organizas "lernejon en la naturo" por lernantoj, somerripozojn kaj skiferiojn por infanoj.**
**Ĉirkaŭ la ripozejo kreskas arbaro de abioj kaj piceoj, kaj inter ili troveblas montaj herbejoj.**
**Apud la ripozejo estas infanludejo kun diversaj ludiloj. Tuj apude estas ankaŭ granda herbejo kie oni povas ludi grupajn ludojn.**

**Ĉirkaŭaĵo donas multajn eblecojn por promeni kaj observi birdojn, florojn, fungojn kaj kolekti sovaĝajn fruktojn (mirteloj, framboj…).**
**Infanoj havos eblecon provi rajdi ĉevalojn.**
**Ĉambroj estas kvinlitaj kaj ĉiu ĉambro havas propran enirejon kun ŝrankoj, duŝejon kun necesejo kaj balkonon.**
**Ankaŭ personaj libroj, muzikinstrumentoj kaj ne tro grandaj ludiloj estas bonvenaj.**

**Ni preparos pilkojn (kaj aliajn flugantajn ludilojn), sociajn ludojn kaj materialojn por desegnado, modelado…**
**Ĝis nun aliĝis 7 infanoj.**

**Venu ankaŭ vi kaj ne forgesu bonan humoron!**

**Ĝis nun al la kongreso aliĝis 101 esperantistoj el 21 landoj**: Pollando, Francio, Rusio, Hispanio, Italio, Portugtalio, Ukarainio, Hungario, Svedio, Danio, Belgio, Ĉehio, Aŭstrio, Serbio, Britio, Nederlando, Slovakio, Litovio, Svislando, Kanado kaj Slovenio. Ni atendas ankaŭ vian aliĝilon. **Gejunuloj atentu: Se vi aliĝos antaŭ la 1-a de januaro 2007, kaj vi estas malpli ol 25-jara, vi ne devos pagi aliĝkotizon!**
**Vesna Obradović**

---

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
**Finredaktita: la 23-an de decembro 2006.**
**Redaktorino: Vesna Obradović.**
**En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Peter Balaž, Vladimir Lariĉev kaj Vesna Obradović**
**Leterojn kaj komentojn sendu al la sekretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si**
**Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com**
**Retpaĝo: http://www.lingvo.org kaj http://europo.eu**